# ELISÉE RECLUS

Filo de pastro, liberpensulo; anarkisto, kiu celis la plej fortan regadon — regadon sur sin mem; eksigito el lernejo pro malstudemo, plej klera kaj verkabunda sciencisto; severa por si, indulgema por aliaj, raciega homo, kiu metis bonkorecon en la unuan ecrangon; tia estis Elisée Reclus (Elize Reklü'), kiu pasigis, de 1830 ĝis 1905, plej noblan kaj utilan vivon.

Li naskiĝis en Dordogne, Francio, de patro, kiu estis el tiuj maloftaj pastroj, kiuj enkondukas la kristanan moralon en la ĉiu-tagan vivon. Liaj multnombraj gefiloj, kvankam sin turnante for de lia kredo, amis kaj respektis lian karakteron, kiun ili grandparte heredis, aldonantaj al ĝi ne-ordinaran inteligentecon kaj sciamon. Krom Elisée, Elie (lia amata kunulo dum la plej granda parto de l' vivo), Paul kaj Onésime distingiĝis per scienca laboro.

Elisée ricevis siajn unuajn porrevoluciajn lecionojn ja en la medio de eklezia lernejo, kie li rimarkis la favoran traktadon al la riĉaj knaboj, ankaŭ la nacieman spiriton de la lernantoj germanaj kaj francaj, kiuj ofte interbatalis. Pli malfrue, li kaj lia frato Elie estis eksigataj de alia lernejo, ne volante perdi sian tempon por teologia instruo.


En 1851, Elisée komencis interesiĝi pri scienco, filozofio kaj sociologio, kaj iris por studi Berlinon, kvankam tro malriĉa por pagi la universitatajn impostojn kaj por reveni Francion aliel ol piede. Post la Napoleona perfortaĵo en tiu jaro, la du fratoj estis devigataj forkuri, kaj Elisée, post kelka tempo en Britio, iris al Norda Ameriko. Tute sen mon-rimedoj, li faris iun ajn man-laboron haveblan, ĝis li trovis bonan oficon, kiun li baldaŭ lasis, ĉar lia estro tenis sklavojn kaj li mem iĝis kontraŭsklavedulo.

En 1855—56, li sin trovis en Suda Ameriko, kiel terkulturisto, kaj en proksima jaro, post la amnestio, denove en Francio.

De tiu tempo, li povis trankvile sin prepari por sia granda laboro de geografo kaj baldaŭ komencis presigi en revuoj artikolojn pri geografio kaj politiko, precipe pri Ameriko. En 1868 ĝis 1869 aperis lia grava verko: La Terre (La Tero), kiu lokis lin inter la unuarangaj geografoj de l' mondo.

Sed... baldaŭ eksplodis en Parizo la Komuno, en kiu li, Elie kaj Paul batalis kun la ribelantoj. Ĉe la malvenkego, ili estis kaptataj kun aliaj miloj kaj evitis ekzilon nur per la interveno de usonanino kaj anglaj sciencistoj (inter kiuj, Darwin), kiuj hontigis la burĝan registaron ĝis amnestio al la distingitaj fratoj.

En 1872 oni lin trovas en Svisio, kie en 1890 li komencis sian Universala'n Geografio'n kaj sekvigis al la unua libro alian, ĉiun jaron regule. Ĉi tiu penega laboro ne malhelpis, ke



li partoprenu la naskiĝantan anarkistan movadon, kiun li helpis per ofta propagando kaj verkado.

En 1892 la Komitato de l' Ŝtata Universitato en Bruselo invitis lin doni kursojn pri kompara geografio, sed poste sin retiris, ĉar ili timis lian anarkistan tendencon. La rezulto estis, ke baldaŭ la pli kuraĝaj lernantoj kaj profesoroj fondis la Novan Universitaton, kie la amata Elisée instruis preskaŭ ĝis sia morto. En Bruselo li ankaŭ fondis Instituton de Geografio. Kvankam en la lastaj viv-jaroj li spertis malsanajn krizojn, tio ne malhelpis, ke li daŭris labori per verkado kaj lekcioj en diversaj landoj; ke li vojaĝis kaj eĉ ĝuis la vivadon; ke li gardis ĝis la fino sian mirindan entuziasmon kaj optimismon pri la antaŭeniro de l' homaro.

En 1903 finiĝis lia lasta granda verko, L'Homme et la Terre (La Homaro kaj la Tero), por kiu li unue ne povis trovi eldoniston en Parizo, kaŭze de sia konata anarkista tendenco, kvankam liaj unuaj verkoj portis grandan profiton al la eldonistoj; li sukcesis unue en Anglio presigi la volumojn.

Elisée Reclus estis el tiaj homoj, kiuj neniam disigas pensadon de agado; kiel lia patro, li vivis laŭ siaj principoj, pro kiuj ofte li devis suferi, ĉu per persekutado flanke de l' burĝaro, ĉu per falsa akuzado, ĉu per perfidaj friponaj "anarkistoj". Li forte kredis je edukado, kiel rimedo por revolucio; li pensis, ke anarkismo estas malpli kuniĝo de sociaj ideoj, ol ĝenerala vidado de l' spirito kaj koncepto pri la homa vivado. Li laboris ĉiam pri la "skulptado de la heroa figuro" kiun li prirevis — sia plej bona memo, sciante, ke nenia politika sistemo aŭ manko de sistemo povus daŭre bonefiki sen morala boneco — sindonemo, laborvolo kaj sciamo.

Kiel por Lenin, la laboristoj estis por li fratoj, kiujn li traktis ne kiel estro, sed kiel simpatianto kaj helpanto. Li malŝparis neniun simpation por tiuj, kiuj marŝas delikate inter siaj laborantaj kunhomoj; kiam amikino lin demandis: "Sed kio okazos al mia nevo en via nova socio; li povas nur laboreti?", li respondis: "Do, li manĝetos."

Eble neniam vivis homo, kiu pli bele kreskis laŭ la tri flankoj de l' homa naturo; li havis belan, noblan aspekton kaj estis fortika kaj atleta; lia pensado estis plej forta, profunda kaj efika; lia animo portis poezion en liajn sciencajn verkojn kaj elmontris lian grandan amon al la Homaro kaj al la Naturo; li kapablis akre observi ĉion en sia proksima ĉirkaŭaĵo kaj antaŭvidi malproksimajn tagojn senmezure pli belajn ol la nunajn. El la tri flankoj, eble profitos la homaro plej longe el la morala; la bela korpo nun putras; la sciencaj verkoj jam iĝas iom malaktualaj, kvankam ili restos legeblaj pro la translumigo de la poeta verkisto... sed la ekzemplo de boneco kaj nobleco restos freŝa tiom longe, kiom ekzistos kono pri ĝi...

Kompilita el speciala eldono de "Le Semeur" (La Semisto) de E. K. L.